



Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Januaro: 5 2023

KONDAMNITAJ DU KUNLABORANTOJ DE VIKIPEDIO EN SAUD-ARABIO

Saud-Arabia tribunalo kondamnis du kunlaborantojn de la araba versio de Vikipedio al enkarcerigo dum 32 kaj 8 jaroj. La pasintan monaton decembron, la saud-arabia registaro informis pri la suspendo de la laboroj pri redaktado de artikoloj por Vikipedio faritaj de 16 homoj. Laŭ oficialaj instancoj, ili ne redaktis verajn informojn pri aferoj rilataj al Mezoriento kaj Nordafriko, ĉar ili estis mon-apogitaj de eksterlandaj agentoj. Inter tiuj kunlaborantoj troviĝis Osama Khalid kaj Ziyad al-Sofiani, kiu nun estas enkarcerigitaj.

Siafoje, la organizaĵoj DAWN kaj SMEX, kiuj celas protekti la ciferecajn rajtojn en Saud-Arabio, akuzis al registaro enirigi homojn en la araban version de Vikipedio, kun la celo aperigi nur tekstojn kaj artikolojn favorajn al registaro.

La fondaĵo Vikimedio, tegmenta organizaĵo de Vikipedio, neis la eniron en la enciklopedion de agentoj de la saud-arabia registaro. Tamen, por klarigi la aferon, tiuj arabaj asocioj petis la kreon de internacia kaj neŭtrala



Osama Khalid kaj Ziyad a-Sofiani, saud-arabaj kunlaborantoj de Vikipedio

komisiono, kies celo estus priesplori la agadon de la registaro de Saud-Arabio kaj ties eblan kontrolon de la reta enciklopedio. Samtempe ili petis la tujan liberigon de la redaktoroj de la araba versio de Vikipedio nun enkarcerigitaj.

Ne temas pri la unua denunco kontraŭ la registaro de Saud-Arabio pro ties interveno en la reto. Antaŭ kelke da tempo eksa laboristo de Tvitero en Usono estis akuzita kaj juĝita, ĉar li estis kaŝita agente de la registaro Saud-Arabio kaj li kolektis informojn de uzantoj de tiu retejo, kiuj povus esti kontraŭuloj al la registaro.

Vorto de la Semajno

Cedi:

1. Lasi al iu ion, kion oni okupis, posedis aŭ pretendis.
2. Formale transdoni posedaĵon aŭ rajton al alia persono.

Cedanto: Tiu, kiu cedas.

Cedaĵo: Aĵo aŭ rajto cedita.

Necedebla: Tia, ke oni ne povas transdoni ĝin en la posedon de alia persono.

Sinonimoj: doni, transdoni, havigi.

La kreditoro cedis al alia homo sian rajton ricevi la ŝuldon de la debitoro. Tiu nun fariĝas la nova kreditoro.



Memoru, ke jam estas tempo aliĝi aŭ realiĝi al Internacia Jurista Esperanto-Asocio. La kotizo estas ege malalta: 7 eŭroj / 14 eŭroj jare, depende de la ŝtato kie Vi rezidas, jur-studentoj pagas neniom. La kotizo estas pagebla al la UEA-konto ejax-r. Ekzistas alia maniero pagi la kotizon pere de mon-sendo en banko-konton. Kontaktu kun ni.

jurista@esperanto.ac

